PILO-PRESS
Interncia Informservo
N-ro 8/1973 19 feb 1973
Aperas ĉiusemajne

PENTEKOSTON 1973
LUKSEMBURGO
ESPERANTO KONGRESO

Luksemburga glumarko
1 folio = -,85 GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



Plene okupita estis la lingvo-laboratorio de la Fridtjof-Nansen-Mezlernejo en Gronau okaze de la semajn-fina intensa Esperanto-kurso, la 10/11 feb 1973, organizita de ESPERANTO-PROGRAMITA. La foto montras la junajn kaj maljunajn partoprenantojn. Dekstre starante: Hermann Behrmann.

## Kursaj sekvoj

Gronau (HB) Sekve de la intensa Esperanto-kurso junuloj de Gronau esprimis la deziron pli detale informiĝi pri Esperanto. Informkunveno okazos sabate, 24 feb 73, 14 h, en la urba junulara hejmo. Parolos Gisela Jungkamp kaj Helmut Klünder.

**********

## "Studmiraklo" el Nürnberg

Nürnberg.(PP) Diversaj gazetoj raportis jam pri la 82-jara emeritulo, kiu kiel 75-jarulo komencis lerni fremdajn lingvojn kaj nun ankaŭ studas Esperanton en la popola altlernejo de Nürnberg. Ankaŭ la dua germana televido ZDF jam preparis elsendon kun la studemulo Otto Gärtner (vidu la foton!) Espereble ĉi-foje la televido serioze traktos Esperanton, se oni mencios ĝin.




Ohne Fleiß kein Preis, meint Student Otto Gärtner

**Mit 82 noch auf der Schulbank**

Der Nürnberger Otto Gärtner drückt seit sieben Jahren wieder die Schulbank. Mit 75 hatte der rüstige Rentner angefangen, fremde Sprachen zu lernen. Im Bildungszentrum der Franken-Metropole lernte der heute 82jährige erst Englisch, Französisch und Italienisch. Zwei Jahre später kamen die Fächer Spanisch und Tschechisch dazu, und jetzt lernt er außerdem noch die Universal-Sprache Esperanto. „Lernen hält fit", meint der eifrige Sprachstudent.

Feriadoj en Pollando

Miedzyzdroje. La Turisma Oficejo Gromada kaj Pola Esperanto-Asocio en Szczecin invitas esperantistojn kaj simpatiantojn de la internacia lingvo Esperanto al la

III-a Esperanto-Feriado en Miedzyzdroje ĉe la Balta Maro de la 17 - 28 junio 1973. La prezo estas 1.540 zl.

Informojn donas: GROMADA, PL-70 414 Szczecin, Pl. Lotników 7, Pollando

Miedzygórze. En la tagoj 16 - 29 sep 1973 en pitoreska montara ripozloko Miedzygórze okazos la IX Internacia Esperantista Feriado " LA ORA POLA AŬTUNO". La feriadon organizas Feria Fako de Polaj Sindikatoj kaj la Vojevodia Filio de Pola Esperanto-Asocio en Vroclavo. Partoprenkotizo estas 1.570 zl.

Informojn donas: Pola Esperanto-Asocio, Wroclaw 17, ul. Dubois 3, Pollando.

Bulgara turisma ekspozicio en Essen

Essen (PP) Laŭ informo de Bulgara Esperanto-Asocio dum marto en la germana urbo Essen okazos ekspozicio por la kampadejoj organizita de la bulgara komitato por turismo. Esperantistoj, kiuj vizitas la ekspozicion, demandu pri la esperant-lingvaj broŝuroj "Bulgario" kaj la bulteno "Bulgario - Turisma Informo". Detalojn oni petu de Bulgarisches Frendenverkejrsamt, D-6 Frankfurt/M, Kaiserstr. 59, tel. 252855

Salutoj el Finnlando

De la ĉi-jara Finna Esperanto-Kongreso sendis al Pilo-Press salutojn ges-roj D-ro Werner kaj Elsbeth Bormann. La salutkarton subskribis 8 finnaj esperantistoj.

299 aliĝoj por Luksemburgo

Luksemburgo. Laŭ informo el Luksemburgo aliĝis ĝis la 17 feb 73 299 kongresanoj por la ĉi-jara Eŭropa Esperanto-Kongreso. Aliĝis el Britio 2, Belgio 50, Germanujo 95, Francio 67, Italio 10, Nederlando 63, Luksemburgio 12.

Kaj tamen estas Karnavalo

Münster. Sub la devizo "Pli bone ol bona volo, okaze helpas pilolo" la Monastera Societo Esperantista invitas ĉiujn gemalsaĝulojn kaj nepensantojn al sia tradicia plej grava eksterordinara tria KUNSIDO KARNAVALA.

Tempo: 24 feb 1973 je la 16a horo

Loko: BSW-Kulturraum, Münster (Westf.), Hamburger Str.2 (apud la substacia tunelo)

LA SEMAJNO EN LA RADIO

La mondo kaj Varsovio parolas pri Kopernik, la fama astronomo. Oni memoris la polan astronomon en la Esperanto-Ekspreso kaj lunde posttagmeze oni raportis detale pri la solenaĵoj en Torun. Ankaŭ la lunda komentario apartenis al Kopernik. Certe oni ankoraŭ ofte parolos pri Kopernik dum la daŭro de la jaro. - Cetere la germana revuo "Brücke" raportis pri E-aktivecoj lige kun la Kopernik-jaro.